APRILO 1957 N-RO: 3

La Objektivo

Organo de Asocio por
Universala, Racia kaj Objektiva Homkulturo
S. A. T. en Sudameriko

Administrado kaj Redaktado:
G. Ledon - rua B. Martins, 371
PELOTAS - R. G. S. - Brazilio

PRI PSIKOLOGIO

INTERVJUO KUN PROFESORO IGOR CARUSO

Konforme al niaj antaŭaj klarigoj, por konservi kiom eble plej bonan objektivecon, ni provos prezenti kiom eble plej da temoj nin interesantaj sub formo de enketo kaj intervjuo.

Psikologio estas temo ofte diskutata, iel nova scienco, do ni vidu kion ni povas esperi de ĝia manifesto, kiel ĝi povas esti utila al ni, por homperfektiĝo. Ni do demandu la eminentan profesoron:

1) Kiel vi difinas la psikologion? Kiu estas ĝia celo?

— Psikologio estas la studo de la homa konduto, por pli bone atingi la komprenon de la vivo kaj de la homo.

Ĝia celo estas la serĉo de la pura vero. Ĝia praktika celo estas apliki pli bonan komprenemon inter la homoj.

2) Kiuj estas la metodoj kaj teknikoj de psikologio kaj psikanalizo?

— a) Metodoj eksperimentaj, kiuj estas gravegaj sed nur konigas duagradajn reagojn.

b) Analizaj metodoj, kiuj traserĉas la motivojn de la homa konduto.

c) Fenomenologiaj metodoj, kiuj estas priskribo kiom eble plej objektiva de la konduto.

d) Sciencaj metodoj, kiuj estas la scienco de la homo.

3) La granda krizo kiun ni travivas estante ia neŭrozo kies diagnozo resumi-

FAŜISMO MILITO!...



SPEKTRO DE NIA MONDO...



ĝas kiel malekvilibro inter altruismo kaj egoismo, kiujn rimedojn vi antaŭvidas por solvi tiun krizon?

— Mi pensas ke psikologio povas kunporti modestan kontribuon, ĉar studante la homon ĝi konstatas pli kaj pli, kaj science ke la homo estas des pli n o r m a l a ju pli ĝi disvolvas en si, siajn denaskajn kapablojn de socia vivo, interhelpo, amo, ktp.

4) Ĉu vi pensas ke la spontaneaj kondutskemoj de la homo akordiĝas kun ĝia nuna konduto en la socio?

— Ne, tro malofte, ĉar la homo havas la eblecon forpeli tiujn denaskajn kondutskemojn. Ekzemple, en la plej parto de la animalaj specioj superaj, individua kontakto inter individuoj kondukas al la reglamentado kaj al malgravigo de la batalemo. Nu, la homo povas eviti la personan kontakton, ekzemple produktante detruilojn kiujn ĝi povas agigi de sia laboratorio, sen neniu kontakto kun la supozitaj malamikoj.

5) Ĉu la etiko kaj la leĝaro, kiuj estas la kondukiloj de niaj organizo kaj konduto sociaj, psikologie akordiĝas kun la konduto reala de la homo?
Kiu devos esti la leĝa kaj etika bazo?

— La etiko kaj la leĝaro estas simboloj pli aŭ malpli proksimumaj al niaj denaskaj kondutskemoj kaj devus progresi kaj e s t i adaptitaj.
Mi ne pensas ke oni povu konstrui etikan kaj leĝan bazon, ĉar la propreco de la homa konduto e s t a s progresi kaj sin preterpasi. Necesas do ekvilibro inter la kondutstudo kaj iu racia filozofio.

6) Laŭ vi ĉu religio e s t a s psikologie necesa?

— Mi pensas ke religio estas fakte adekvata al la homaj kondutskemoj, sed la homo havas l a eblecon peli siajn proprajn kondutskemojn.

7) Se la religio kiu estas iu speco de redukto samtempe intua k a j empiria de la nekonataĵo kaj kondutskemoj a l simboloj, n e korespondus al la kosma realo, al la dia realo, ĉu tiuj simboloj ne estus tiam danĝeraj, kaj unu el la kaŭzoj de nia k r i z o eble?

— Oni fakte faris multajn krimojn je la nomo de la religio, tio estas ĉar oni miksis kun religio elementojn kiuj al ĝi ne estis propraj sed kiuj apartenis al aliaj kondutskemoj: ekzemple atakemo, memfirmiĝo, ktp.

8) Ĉu vi pensas ke la homo povus konscii s i a n propran manifeston kaj regi sian konduton? ĉu vi pensas ke ĝi povus koncepti sian egoismon kaj sian sociemon, kaj t i e l establi spontanee a ŭ memvole kompromison kiu rekonstruus la socian kaj individuan ekvilibron, kaj kiu eble evitus certajn artefaritajn mutaciojn?

— Mi pensas ke ni devas labori en tiu direkto kaj ke oni povas atingi grandajn progresojn en tiu v o j o, kvankam oni devas sin deteni de naiva optimismo. La homa propreco estas vivi idealon kaj serĉi vojon por plenumo de tiu idealo. La psikologio devus ĝin helpi sur tiu vojo.

9) Ĉu vi vidas tion kion oni nomas animo, spirito ktp, kiel simpla organa kaj fiziologia povo aŭ kiel dia, metafizika povo?

— Mi pensas ke estas la du, ke la homa spirito estas ankrita en la homa naturo, sed ke ĝi estas rilatpunkto kun fortoj preterpasantaj.

10) Kion vi pensas pri spiritismo?

— Mi pensas ke ĝi respondas je simbolaj postuloj, sed ke tiuj-ĉi estas malbone komprenitaj kaj devojigitaj de sia propra signifo.

11) Kion vi opinias pri la surrealista metodo, koncerne la trastudoj de la senkonscio?

— La surrealismo ne estas pensebla sen Freud: ĝi estas grava reago kontraŭ la ignoro de la homaj simboloj, sed mi ne pensas ke ĝi estas sukcesinta doni adekvatan liberigon de tiuj simboloj.

12) Kion vi pensas pri la Pavlov-skolo?

— Estas multegaĵoj lernindaj. Estas ekzakta studo de la homaj reagoj, sed la rezultatoj devas esti relokigitaj en ĝenerala vido.

. . . . . .

Kvankam ne ĉiam tre precizaj estas la respondoj, pro la amplekso de la intervjuo, kaj pro la malmulta tempo kiun la intervjuito povis disponigi al ni, ni vidas ke psikologio, kiel scienco, estas tre ligita al nia propra idealo, al nia klopodado por perfektigo. Nedubeble, la studo de la homa konduto povas esti fundamenta por hom-sociplibonigo. Tre verŝajne ni multon lernos sur tiu tereno, kaj pri ĝi ni probable ofte reparolos.

Multajn komentariojn ni ne faros, ni nur provu kompreni kaj ekvidi ĉu ne estas, malgraŭ, ĉio, punktetoj dubsencaj.

En la tria punkto ni lernas ke: "La homo estas des pli normala, ju pli ĝi disvolvas en si siajn denaskajn kapablojn de socia vivo, interhelpo, amo, ktp." Tio estas fakto kaj neniu el nia movado, nek el sinceraj idealismoj pri tio dubis, ekzemple en la SAT-statuto la klerigado tion celas, kaj konscii sian homan pozicion estas nenio alia ol trovi siajn denaskajn kapablojn spontaneajn. Ni tamen demandu: Kiuj estas la denaskaj kapabloj de socia vivo? Sendube estas tiuj kiujn ni renkontas ĉe individuo kiu ne estis submetita al iu trudita eduko, ne respektis devige kutimojn, leĝojn, religiojn, morojn antaŭestablitajn... en unu vorto, tiuj denaskaj kapabloj estas la kapabloj de la homoj kiuj konscie sin liberigis de ĉiuj mistifikoj, mitoj kaj antaŭjuĝoj.

Ni plue akordiĝas kiam ni legas ke la homo havas la eblecon forpeli siajn denaskajn kondutskemojn; ankaŭ la ekzemplo citita estas ege ŝatinda. Ni povas facile dedukti ke se la homo havas tiajn eblecojn (pure intelektaj), ĝi nepre devas ankaŭ havi la eblecon konscii pri la forpelo de siaj denaskaj kondutskemoj, konsekvence, la homo devas havi la eblecon kon-

(Sekvo paĝo 3)

Faŝisma Hekatombo Preparigas

Ĉiuj homoj en la mondo atente sekvas la lastajn politikajn eventojn. Eventoj kiuj fariĝas pli kaj pli atentindaj de la okazaĵoj en Suezo kaj Hungario. Ĉiuj unuanime akordiĝas por diri ke estas la komenco de la finpreparoj de la mondmilito... de la nova mondmilito, ĉar oni jam ne plu scias la kioma estas!

En la realo Suezo kaj Hungario estas la du ĵetkuboj kiuj preparas la ludeton de la du grandaj mondakaparistoj, kaj ties satelitoj, Antaŭ ol komenci la batalon ĉiuj elementoj devas esti maturaj. La atombomboj jam de longe estas. Restis do unu polurado: la popola psikologia stato. Hungario kaj Suezo venis ĝustatempe kaj oportune.

En la nomita Oriento, Suezo fariĝis la simbolo de la kapitalisma imperiismo, de la koloniismaj pretendoj. Ja sufiĉa motivo por ke tiuj orientaj popoloj tretu pro naŭzo, kaj intervenu. En la Okcidento, Hungario fariĝis la simbolo de la genocido, rebildiganta la naziisman spektron de Hitler: pli ol sufiĉa motivo por ke ĉiu honesta civitano saltu al la pafiloj. Ĉio tio fariĝis sufiĉa motivo por ke la vorto "Paco", la obsediga vorto kiun ni aŭdas remaĉi de dek jaroj forflugu... La blankega kolombo estas gravege vundita!

Estas ankoraŭ multaj tielnomataj pacistoj kiuj apenaŭ kredas, kaj dubas. Ho naiveco! Naiveco kredi ke pacon oni konstruas per preĝado kaj per formado de pacistaj movadoj kun belsonaj statutoj. En nia nuna mondorganizo ni ne forgesu ke la milito havas sian propran leĝon fizikan, ni ne forgesu ke por nuligi tiun leĝon ni simple devas nuligi la nunan sociordon. Alia rimedo ABSOLUTE NE ekzistas. Neniu pensu ke tian leĝon nur supera matematikisto povas koni, ni ne bezonas esti profetoj por antaŭvidi la hekatombojn. Mi persone havis okazon aserti en 1950 ke antaŭ 1960, nova milito venos: Ni estas en 1957... sur la sojlo! Jes por fari tian aserton radiestezilo ne estas bezona, kiel ĉiam sufiĉas observi. Observi ekzemple ke tri jaroj post la lasta milita detruado, ĉio riparenda estis praktike riparita, ke jam en 1949 la senlaboreco estis granda, ke stokoj de produktaĵoj jam montariĝis kaj putriĝis dum mizero kreskis. Tiam oni faŝisme sin strečis kaj forigis iom da senlaboreco fabrikante intensive armilojn, multajn armilojn. Nun la armilojn oni ne plu scias kien lokigi, ĉiun bombotipon oni provis kaj perfektigis... Fine "ekonomiaj krizoj" denove minacegas. (Ĉiuj tion povas legi en sia tagĵurnalo,)

Nun, en tia situacio, kiu estas la solvo? Kiu estas la solvo, ne por ni proletoj, kiuj ĉiam restas mizeruloj, senlaboruloj kaj kanonkarno, sed por la kapitalistaj regantoj?... Solvo: la milito, faŝisma trudo de la milito.

Jes la oficiala eksplodhoro aproksimiĝas, oni pretigas la lastan formalaĵon post la psikologia apreturo de la popolo: la motivo! Vere tiuj abundas, abun-

(Sekvo paĝo 6)

(Sekvo de la paĝo 2)

servi siajn denaskajn kondutskemojn. Ĉio tio, estas dialektike unu nura ebleco. La konservo de la denaskaj kondutskemoj estas cetere nia vera celo, kie ni strebas per individua memstara kleriĝo.

Ni mem ne dirus pli bone ol profesoro Igor Caruso, kiam li diras ke la etiko kaj la leĝaro estas simboloj pli aŭ malpli proksimaj de niaj denaskaj kondutskemoj... Ĝuste pro tiu pli aŭ malplia proksimumeco, ni estas kontraŭ antaŭestablitaj, artefaritaj leĝoj kaj moraloj. Jes ja, la nura valoranta leĝaro kaj moralo estas tiu denaska kondutskemo kiu nur povas manifestiĝi en spontanea konduto. Ni konfesu ke se psikologio daŭrigus tiel sen devojiĝoj devigaj... kiuj bedaŭrinde jam okazis de longe... ĝi rapide, science demonstrus, la cetere jam demonstritajn konceptojn de grandaj pensuloj kiel Kropotkin, Bakunin, Reclus, kaj multaj aliaj, kaj eble la mondhaoso rapide finiĝus.

Bedaŭrinde en la punkto 6 de la intervjuo, niaj esperoj iom devas stompiĝi. Li jam diras ke religio estas adekvata al la homaj kondutskemoj. Sed la vorto "denaska" jam foriĝis dum li reparolas pri pelo de siaj propraj kondutskemoj. Jen kontraŭdireto kiu sufiĉas por nuligi la supozitan adekvatecon!

Cetere religio, tiuj simboloj kie la homoj sin alkroĉas, ĉu ili mem ne devenas de tiuj famaj homaj eblecoj peli aŭ malpeli la kondutskemojn? Profesoro Caruso, vole ne vole mem donas la respondon en la naŭa paragrafo kiam li diras ke la spirito estas tiel organa kiel metafizika, kaj kiam li parolas pri tiuj famaj "fortoj preterpasantaj"... fonto de la tuta metafiziko, mistiko, religio kaj multaj tiaj plagoj. Bedaŭrinde la homo ne akceptas "preterpasantajn fortojn", ĝi mem pretendas ĉion preterpasi, superi, kaj tiel bezonas simbolojn. Kiel prave diras nia intervjuito, la homo kreas aŭ volas trovi mitojn.

Je tiu mita serĉo, jes surrealismo fiaskis, kiel ĉiuj tiaj movadoj, ĉar ĝi celis realan miton, sed reala mito ne ekzistas. Mito sen altaro, hostio, kandelo, spiritfantomo, manao, ŝakraso, aŭ io tia ne povas vivi, aŭ nur vivas provizore, mallonge en la eterno, pro la simpla fakto ke estas unu reala simbolo, unu reala mito por ni: estas la homo en sia simpla manifesto, en la socio, sur nia planedo, en la speciaro, en la kosmo. Ni aldonu ke la homo eĉ ne devas sin konsideri kiel mito, ĉar se ĝi mitiĝus, ĝi ree forgesus sian denaskan kondutskemon kaj fabrikus novajn simbolojn, novajn diojn, tiel ke ĉio ree fiaskus: Tio estas la kazo de surrealismo, de ekzistadismo kaj ceteraj marksismecaj provoj kiuj estas por ni la praktika pruvo.

Resume Psikologio donis al ni plian liberigan ŝlosilon, ni sciu uzi ĝin atentante ne difekti la homan seruron! Intertempe dankon al Profesoro Igor Caruso.

NOTO — Ni plezure publikigos pliajn komentariojn de niaj legantoj.

LA FUNDO DE L'MIZERO

W. Sieroszewski verkis belegan romanon kun tiu titolo. Versâajne multaj legantoj jam konas tiun literaturaĵon kiu pentras la teruran staton de la lepruloj, kiuj estis kondamnitaj vivi izole, sen helpo, en frosta agonio ĉe la siberiaj stepoj. Pli bone pentri la mizeron neniu povus kaj ĉiu leganto en tiu verko, horortremetas sin demandante ĉu eblas?

De tiu epoko la sorto de la lepruloj iom mildiĝis dank'al la scienco kiu donis sian oboleton al tiuj martiroj. Tiel en nia nuna epoko la fundo de l'mizero akiris alian formon, kaj translokiĝis al plago eble pli lepra ol la lepro mem. La fundo de l'mizero nun estas la kapitalisma sociordo, kie kvazaŭ samaj suferstertoroj reproduktiĝas, ĝeneraligitaj en la tuta mondo.

Fari tian aserton sen pruvoj estus malsaĝe, do mi detale, ne romane, demonstros ke fakte la fundo de l'mizero kuŝas en la kapitalismo. La demonstro estas cetere facilega, tiom facila ke ĉiu povas fari ĝin por si, nur necesas ekzemple rigardeti sian taggazeton kaj penseti. Por respekti la titolon de nia organo, ni objektive rigardu bilancon de iu firmo, publikigita dum la lastjara marto en la tagĵurnalo de la urbo Pelotas. En tiu firmo mi estis tiam ĵus laborinta, kio faciligas la komentariojn.

Por ŝpari la spacon mi tradukos nur la plej interesan parton.

(Vidu la bilancon)

Sendube ĉiuj malkovris ke tiu bilancekstrakto estas gema dokumento, ĉiuj jam vidas ke ĝi estas perlo kiu lumblindigas nin kaj samtempe disbatas nin ĝis la fundo de l'mizero.

Kio unue ŝokas nin estas la fakto ke por 1.427.354,60 kiel enspezo, estas pli ol la duono de tiu sumo kiel profito: 818.573,20. Ne malpli ŝoka estas la konsekvenca proporcio inter la elspezoj kaj profito. Tre instruaj estas tiuj elspezoj kiuj entenas salajrojn, honorariojn ktp. Ekzemple la direktoro ricevis el tiuj 531.101,20 pli ol 100.000,00 kiel honorariojn: kvar monatoj po 6.000,00 kaj ok monatoj po 10.000,00. Alia subdirektoro kiu laboris dum 6 monatoj enpoŝigis 50.000,00. Mi mem, kiel teknikisto almozis 45.000,00 en la jaro, el tiuj 531.101,20. Pri la kromaj laboristoj estas malfacile precize scii, ĉar ofte iuj ne laboris pli ol monaton en la firmo, ktp. Tamen mi scias ke ne pli ol 2 laboristoj salajris po 3.000,00, 4 aliaj gajnis ĉirkaŭ 2.500,00, la kromaj oscilis je la minimuma salajro tio estas 1.800,00 monate.

Supozante ke estis nur 60.000,00 kiel ĝeneralaj elspezoj ekster la salajroj kaj honorarioj (tiu sumo praktike estis pli granda, ĉar nur la sideja luo estis pli ol 35.000,00), ni renkontas ke 470.000,00 el la elspezoj estis pli aŭ malpli distribuitaĵ laŭ la tabelo ĉi-posta.

Demonstro de la Konto Pri "Profitoj kaj Perdoj"

ĝis la 31-a de decembro 1955

DEBETO		KREDITO	
Tutjaraj elspezoj:		**Enspezoj el la operacioj:**	
Luoj, anoncoj, brulaĵoj lubrikaĵoj, vojaĝoj, stampoj, transportoj, salajroj, gratifikoj, honorarioj, impostoj, interezoj, lumo, telefono, kontormaterialo, telegramoj, kaj diversaj elspezoj . . .	531.101,20	Produkto de la sociaj operacioj . .	1.427.354,60
Provizoj:			
Fonduso por senvaloriĝo de veturiloj	22.775,20		
Fonduso por senvaloriĝo de mebloj kaj laboriloj	11.592,60		
Fonduso por senvaloriĝo de instalaĵoj	299,20		
Rezervoj:			
Fonduso de leĝa rezervo	43.032,80		
Saldo:			
Saldo je la dispono de la asembleo	818.573,20		
Sumo de la debeto	1.427.354,60	Sumo de la kredito	1.427.354,60

Pelotas 28-an de februaro 1956

La direktoro — La kontisto.

La profitsistemo kaj ĝiaj efikoj, rekte minacas la vivon kaj la liberecon de la homo kaj tial estas egalaj al KRIMO.

Klaso		Kvanto de Laborantoj	Perlaboro Monata po unuo §	Sumo
Proletoj	Senfakaj laboristoj	4	1.800,00	85.000,00
	Fakaj laboristoj	4	2.500,00	120.000,00
	Ĉeflaboristoj	2	3.500,00	70.000,00
	Teknikisto	1	4.000,00	45.000,00
Kapitalistoj teknokratoj	Ingeniero	1(dum duonjaro)	8.000,00	50.000,00
	Direktoro	1	10.000,00	100.000,00
			Sumo	470.000,00

§ Tiu monata perlaboro estis valoranta en la fino de la jaro rilatanta al tiu Bilanco.

Longe komentarii tiun tabelon ne ŝajnas al mi necese, ĝi, en si mem parolas pli ol diskursoj, ĉar ĝi reprezentas kune kun la reproduktita bilanco, la realan staton de nia nuna sociordo kun siaj respektivaj klasoj. Ni vidas klasojn eĉ ĉe la proletoj: ĉeflaboristo jam perlaboras la duoblon de la perlaboro de la senfakaj laboristoj. Ni scias ke tiu fama nomita minimuma salajro estas salajro fiksita de la kapitalistoj regantaj, kaj ke ĝi permesas kiel indikas ĝia nomo, la minimuman viveltenon; ĝi perfekte korespondas al la porcio kiun oni iam donis al la sklavoj por ke ili povu produkti kaj... eviti la morton. Mi ne bezonas aldoni ke eĉ la ĉeflaboristo estas mizerulo malgraŭ sia duobla minimuma salajro. Nur la teknikisto, la plej altranga proleto, vivetas decete, preskaŭ dece en la minimumaj homaj bezonoj. (La tiea teknikisto estis mi tial tion mi scias!) Kiel tion ni vidas, abismo kreiĝas inter la proletaj teknikistoj kaj la teknokratoj... ĉe tiuj lastaj, tuj la perlaboro pli ol duobliĝas. La ĉefaj diferencoj inter la teknikistoj kaj la teknokratoj estas tre facilaj: Unue, la teknikisto ricevas salajron dum la teknokrato havas honorariojn, due, la teknikisto posedas malmultajn diplomajn titolojn, sed praktike estas kapabla (pro proleteco eble!), dume, la teknokrato bombastas per mil doktoraj titoloj kaj honorlegioj, kaj praktike scias nenion fari (pro burĝeco sendube!), trie, la teknikisto estas regata proleto dum la teknokrato estas kapitalista reganto.

Antaŭ ol daŭrigi la komentariojn, ni rigardu la sorton de la fama profito: 818.573,60. La kapitalo de la firmo estis 1.100.000,00, tio signifas do ke la profito estis 80% de la kapitalo. Praktike el la 818.573,60, 86.165,60 estis donitaj al la direktoroj... tio estas la du teknokratoj, kaj 72.848,20 al la kromaj laboristoj. Kia miraklo! Mi konfesu ke el tiu lasta sumo mi nenion ricevis ĉar intertempe mi estis lasinta la ekspluatejon, aliaj laboristoj plendis al mi ke ili ankaŭ ricevis nenion, aliaj nur 500,00, do mistero pri la kuko! Finfine, oficiale la parazitaj akciuloj (la asembleo, ĉu ne?) distribuis al si 659.559,80. Tiuj parazitoj estis 8, posedantaj respektive kiel kapitalo: la 1-a: 300.000,00, la 2-a: 200.000,00 kaj la 6 aliaj po 100.000,00. La unua parazito ricevis do pli aŭ malpli 180.000,00, la dua: 120.000,00 kaj la ses aliaj po "nur" 60.000,00.

Jen karaj legantoj, pliaj ciferoj kiuj lernigas pli ol dek enciklopedioj kune! Vidu ekzemple tiun unuan ŝankran asembleanon: li posedis 300.000,00, kaj multajn tiajn sumojn krome en aliaj lokoj, kiujn li sendube heredis de sia patro, kiu mem estis posedanto de miloj da sklavoj eble, aŭ estis senskrupula ekspluatanto. Nun pro la simpla fakto ke li havas tiun sumeton: 300.000,00 sur fikcia presita papero, sen fari neniun penon, li ricevas 180.000,00. Li leĝe ŝtelis 180.000,00, kies ekvivalenta produkto devenis laboristan ŝviton. Jes, ĉu ĉiu bone konscias ke tiu 180.000,00 korespondas al la salajro de pli ol 7 laboristoj kune? Sep laboristoj kiuj dum tuta jaro brute, sklave ŝvitadis por mem mizere vivaĉi kaj ĝuigi burĝojn. Ni rigardu la tabelon, ni komparu, kaj ĉiu el ni vole ne vole malkovros la "Fundon de l'Mizero", ĉar en nia nuna epoko la fundo de l'mizero estas la kapitalismo kaj ĝiaj manifestoj.

Tion kion ni konstatis por la unua kapitalisto same valoras por la aliaj, tial ni nur pravigu la vorton "kapitalisto", kiun mi aldonis al la vorto "teknokrato" de la tabelo. La pravigo estas simplega, ĉar okazas ke fakte la teknokratoj estas samtempe akciuloj, do kapitalistoj. La direktoro ekzemple investis 100.000,00 kiun lia Paĉjo donacis. (Mi diru ke tiu direktoro estas speco de junkro, kiu sin nomas doktoro, ĉar li havis gepatrojn kiuj permesis al li sidadi en fakultato ĝis la 27-a jaraĝo.) Tiu sama paĉjo estis la akciulo posedanta 200.000,00. Resume la direktoro el la enspezo 1.427.354,60, ricevis:

Honorario	100.000,00
Direktora gratifiko (el la 86.165,60)	60.000,00
Dividendajo . . .	60.000,00
Sumo	220.000,00

Tiuj 220.000,00 reprezentas do 15% el la enspezoj! Valoras esti direktoro ĉu ne? Tiom pli ke laboro de direktoro estas pli parazita ol produktiva, kaj al tiuj kiuj refutos: "Sed la respondeco;" mi tuj respondos ke estas pli facile responsi ol trans-

(Sekvo paĝo 6)

(Sekvo de la paĝo 5)

porti brikojn surdorse aŭ puŝveturile, la pruvo estas ke ĉiuj sopiras al tiaj famaj respondecoj. Dume tiuj kiuj ekzemple en tiu firmo transportas brikojn dum 9, 10 horoj tage, ricevis nur 21.600,00 po laboristo. Se vi preferas, la direktoro ricevis pli ol dek laboristoj kune.

Ĉu post tio, iuj ankoraŭ dubas kiam mi asertas ke ĉi-tie kuŝas la fundo de l'mizero? Ĉu homo kiu dignas havi tiun nomon: Homo, ankoraŭ povas agnoski, toleri kapitalismon? Ĉu ĉi-tie ne kuŝas nia plej urĝa celo, nia homa devo? Ĉu sincera homo en la mondo kuraĝas refuti tion kaj perdiĝi en vortspekulado: nia unua malamiko estas kapitalismo, kaj nia celo estas socialisma konstruado por ke la homaj monstraĵoj malaperu.

Ĉar ĉi-tie ni posedas praktikajn ciferojn pri funkcio de kapitalisma firmo, ni provu analizi kio okazus en socialismo pri tiuj samaj ciferoj. Ni pensu pri vera socialismo kaj ne pri iu socialismo kiun ni povus renkonti en niaj nunaj politikaj partioj.

En tiu firmo 13 homoj aktivis, tamen unu laboristo estis en kontoro nur por zorgi pape-raĉojn pri bankoj kaj ceteraĵoj. La direktoro duonparazitis, ĉar li ĉefe zorgis pri komercaĵoj kaj similaj aferoj propraj al kapitalismo. Tiel, praktike ni povas konsideri ke nur 12 homoj produktis la 1.427.354,60.

Kompreneble en socialismo, tiuj 12 homoj estos konsciaj, ili ekzemple konscios ke se ĉiuj laboris same, kaj havas la samajn bezonojn, la produkto devas esti egale distribuita. En nia nuna sociordo ĉiuj scias ke ju pli "grava" laboristo oni estas, des malpli oni laboras kaj des pli oni perlaboras. En socialismo ĉiuj konscios ke la fama responso kiu estas en la praktiko formita de antaŭestablitaj matematikaĵoj iel lerte manipulitaj, estas kiel laboro, larĝe kompensita rilate al brikportisto aŭ kloakisto — male kiel socia laboristo, ŝajnas ke la rubaĵisto rajtas esti favorata per malplia labortempo, rilate al tiu kiu devas respondeci pri konstruado de dudeketaĝa ĉielskrapaĵo. Sed ni diru ke ĉio estas racie ekvilibrigita, ni diru ke ĉiuj konscias pri ekonomia egaleco kaj ke ekspluatado de homo per homo estas eliminita, Tiam en nia ekzemplo, ni supozu ke nur 1.200.000,00 estas disponeblaj kiel vivrimedoj por la homoj. Mi gravigas intence la elspezojn pensante pri plibonigo de laborkondiĉoj ktp. Laŭ tiuj kondiĉoj, en socialismo, ĉiu laboranta homo ricevas... 100.000,00. Bonvolu kompari kun la nunaj salajroj. Eĉ la plej "altranga" proleto kuŝas malproksimege! En socialismo ĉiuj kaj ĉiu havos honorariojn de direktoro, jen nia konstato, jen la abundo, la forigo de l'mizero. Mi scias ke malgraŭ ĉio, multaj legantoj pensos; "Utopiaĵo, neeblaĵo". Nu, ŝajnas al mi ke nenio en la mondo povas esti malpli utopia ol tio, ĉar mi prenas pruvojn en en nia nuna monda realo. Tie-ĉi la konsideroj estas faritaj en la nuna kadro socia, sed daŭrigu la pensadeton:... pensu pri produktoj senutilaj kaj malutilaj kiel militaj industrioj, konsciu pri la milionoj de parazitoj kreitaj de nia nuna sociordo, kiel paperaĉuloj ĉiuspecaj, militistoj, bankieroj, kaj multaj aliaj. Tiam eble vi havos klaran bildon pri la socialisma realo, eble vi konscios kio estas paradizo. Tiu fama paradizo kiu ne dependas de Dioj, nek Spiritoj sed de ni mem proletoj, homoj surteraj.

Dume Kapitalismo estas la fundo de l'mizero.

LEDON

(Sekvo de la paĝo 3)

degas: oni ne scias ĉu Suezo, ĉu Hungario tre taŭgas. Por la ŝakaloj la araba petrolo estas tre alloga, eĉ taŭga, kaj verŝajne tra iu "Eisenhower-doktrino" tie-ĉi kuŝas la fajrero... fajrero en petrolo!

Iel ajn estu la situacio, paco ne eblas kiam en ambaŭ flankoj oni fabrikas bombojn, eĉ se estus nur unu. Ĉio plia estas blufo, groteskaj trompaĵoj. Ĉu ni povas akcepti la tezojn de iuj ĉimpanzoj kiel Eisenhower aŭ Bulganin, kiuj asertas ke paco estos asekurita dank al larĝskala armado? Ĉu ni estas sufiĉe stultaj por akcepti la orakolojn de la papa vulturo? Ĉu ni povas fidi la gangsteran komunistan partion kiu pretendas konstrui iun socialismon per kanonoj? Ĉu ni agnosku fantomon kiel ONU, kiu finfine estas instanco de la ŝtatistoj, magnatoj ruĝaj, nigraj kaj blankaj? Jes, tiel idiotaj ni estas ĉar unu fojon plian, ni ĉion fidis, eble iom devige, sed rezigne akceptis. Kaj ni prenu la pafilojn, ni iru al masakro, kiel brutoj al buĉejo!

Nun tro malfruas por eviti tiun hekatombon, sed estas ankoraŭ tempo, se la atombombo ne komplete ekstermos nian specion, sin pretigi por ke plia katastrofo ne okazu ekzemple en 1980 (laŭ la sama progreso). Estas tempo por racie edukiĝi, por konscii nian homan rolon... Tiam harmonia sociordo konstruiĝos, malaperos la kanonoj kaj atombomboj kun la faŝisma spektro. Ni ne forgesu ke ĉio dependas nur de ni homoj, proletoj.

GAROLO

P. S. — Feliĉe, (sed tio ne sufiĉas) oni iom insiste reparolas pri la danĝero de la atombomboj, kaj de la atomenergio ĝenerale kiun oni ankoraŭ iom tro blinde uzadas. Ho ve, ĉiutage ni ankaŭ legas, en la samaj informiloj pri la A-H-bombego, rusa, amerikana, angla eksplodinta, eksplodanta, eksplodonta...

Tio laŭ mi, similas iom al normala konscia individuo, kiu jam vidinte frenezulon incendii la unuan etaĝon de lia domo, lasus lin ekbruligi la kromon!

Ĉu do la mondo tiel altgrade malsaĝiĝis! Sendube jes, ĉar ekzemple en la 1914-18 milito oni uzis la nomitajn asfiksiajn gasojn, sed en la posta hombuĉado oni rezignis pri tiu mortigilo pro la danĝerego. Intertempe aperis la atombombo, oni en 1945 sukcesplene eksperimentis ĝin en Hiroŝima kaj Nagasaki, kaj jubilis konstatinte ke la "gaso" estis nura liliputaĵo,.. kaj tiel oni simple, daŭre venenigas nian planedon, sin pretigas por detrui kontinentojn, kaj eĉ fieras pri tio! Nur en Japanio oni ŝajne komprenis (pro la sperto eble!), kaj replikas.

Nu, diable! kio do estas en la homaj kapoj!

> Laboristo sin gloranta pri sia isteco similas sklavon, kiu sin glorus pri sia sklaveco.

Teorio kaj Praktiko

"TEORIO ESTAS BELA... SED EN LA PRAKTIKO ESTAS ALIA AFERO!"

Jen frazo kiun ni ĉiuj oftege aŭdas. Kaj la plej trista punkto estas ke ĝi veras, plene veras en nia nuna fuŝmondo.

CETERE:

Kial vi estas vegetarano kaj abstinentulo, se via patro estis alkoholulo, kaj se via filo tradicie estos vitkulturisto kaj vinfabrikanto?

Kial vi estas integra naturisto, se vi kondamnas vian filon vivi en sufokiga urbego kaj laboradi en infera uzino?

Kiel vi povas nature vivigi vian bubon se vi mem nur povis naski lin per drogoj?

Ĉu utilas ke vi bene aprobu la fruktoreĝimon se vi mem ne klopodas por ke fruktoj estu malpli kostaj, pli oftaj malpli foraj?

Kiel vi aŭdacas paroli pri justeco kaj egaleco, se vi mem estas ekspluatanta kapitalisto?

Kiel vi povas preĝejen preĝi por homa bono, se hejme vi skurĝas kaj sklavigas vian propran servistinon?

Ĉu eblas ke vi vin konsideru kiel avangardulo, se vi mem ne kuraĝas elĵeti la plej etajn kutimojn, la plej etajn antaŭjuĝojn kiuj katenas vin?

Ĉu vi estas certa ke vi lasus vian socian pozicion? Ke vi rifuzus la fortunon aŭ la heredaĵon de via mortinta patro? Vi celanto de perfekteco, kaj krome naturistteoriulo, kiu eĉ hezitas kuspi siajn manikojn, kie sin kaŝas degenerintaj braketoj, ĉu vi pretas forĵeti viajn vestojn kaj iradi nudnature sub la suno?

Cetere, ĉu vi estas certa ke via teorio validas? Kiel vi povas pruvi la valoron de VIA teorio inter la milionoj ekzistantaj? Vi, teoriulo, kian akrobataĵon vi pretas fari por praktike demonstri ke: Freud, Kristnamurti, Kardek Kristo, Sartre, Marks aŭ alia pravas?

Evidente en tiu situacio, "teorio estas bela, sed en la praktiko estas alia afero! Mi tie plene konkordas, sed bedaŭrinde estas tiu alia afero kiun ni ĉiam atente evitadis. Ja, kio pli facila ol naski teoriojn? Nur ni bezonas havi homan cerbon, kun ĉu oratoreco, ĉu skribscio. Kaj Dio (se ĝi ekzistas!...) scias kion oni povas fari per tiu cerbo; Ni mem, kiuj ne estas dioj, ne ignoras ke tiom da teorioj oni povas baki per iom da imago, iom da fantazio, iom da intuemo, iom da mistiko, kaj ankaŭ certe iom da racio!

Pri praktiko estas alia afero. Fakte, kiu ĝis nun kapablis praktiki teoriojn? Nu, ŝajnas ke krom la frenezuloj, la mensaj malstabiluloj, la eŭnukoj la pentantoj kaj fantaziuloj estas malmultaj. Kaj tio estas plene normala, ĉar normalulo ne povas normale akcepti nek milionojn da teorioj ĉiuj tiom bonaj kiom eble plej, nek unikan doktrinaĵon devenanta el iom da tio, iom da jeno el iu cerbo vagvadanta.

Kompreneble, mi ne volas diri ke ne povas ekzisti teorioj iel bonaj, sed vera teorio homkonforma ne povas deveni el intua vizio, klarvideco aŭ alia halucino, nek el iu arbitra tezo kaj antitezo, ankaŭ ne el matematika dedukto kaj filozofia jonglado. La vera teorio, la unika teorio kiu entenas ĉiujn aliajn kaj refutas ĉiujn mistifikigajn "enlibrigitaĵojn" kaj "diskursitaĵojn" estas nenie kaj de neniu esprimita, ĝi spontanee ekzistas en ĉiu homo sur nia tuta planedo, kaj ne estas disigebla de la praktiko.

Jes, praktiko kaj teorio nur povas servi kiel unu nura manifesto. En la nuna stato de nia fuŝita mondsocio, teorio estas antonimo de praktiko kaj reciproke. Oni fantazias en teorioj por sin ŝajne, fantazie liberigi de iu praktiko kiu iel sklavigas nin.

En tiu sklaveco, en kiu ĉiu el ni vivas, ni supozu ke ĉiuj homoj vivantaj sur la tero, decidus en iu momento ne plu pensi nek pri teorio nek pri praktiko. Aŭ pli simple, ni supozu ke ĉiuj agu spontanee, laŭ sia propra individua kaj socia emo: forleĝoj, kredoj, antaŭjuĝoj, kutimoj, tradicioj, ritoj, doktrinoj... ktp.

Kio okazus? (Al la legantoj kiuj bonvolos tion klarigi al ni, ni estos tre dankaj!)

Mi persone opinias ke estus la perfekta kunfandiĝo de teorio kaj praktiko, aŭ se vi preferas, estus la nuligo de unu kaj la alia, aŭ pli bone, homsocikonforma manifesto de la homo.

Bedaŭrinde fari tian supozon en nia nuna mondo estas tre malsaĝe, sed saman rezultaton ni nepre atingos se ni volas racie edukiĝi, konscii nian homecon kaj veran rolon en la socio. Ni do agu laŭ nia gvidrezolucio, rekonsiderante komplete nian mondon, kaj nia teorio kaj praktiko kunfandiĝos ne en poezioj kaj romanoj sed en nia propra homa kaj socia manifesto per nia ĉiutaga aktiveco.

G. L.

INTERSTENO rilatas al stenografio, kiel ESPERANTO rilatas al lingvoj.

Se vi deziras ricevi tiun publikaĵon, se vi ŝatas ĝin, rapide subtenu nin per via modesta kontribuo: ALIĜU, ABONU. -6 numeroj por 50 kruzejroj, aŭ 1 Us dolaro.

Simpatio estas bela vorto, sed... agoj pli valoras!

La celo de ekonomio estas prizorgi la plenumadon de la materialaj bezonoj de ĈIUJ homoj, tiel de la junaj kiel de la malsanaj kaj invalidaj kiel de la bonfartaj.

Ni ne Prokrastu!

La partoprenantoj de la . . . Brazila Esperanto Kongreso en Niteroi, kiuj dezirus kontaktiĝi kun kamaradoj por interbabili kaj eventuale formi postkongresan apartan kunveneton, bonvolu sin turni al nia sidejo. Ni atentigas ke tia kontaktiĝo estus tre grava kaj bonfara por nia afero.

Ni insiste ripetas ke la nepra kondiĉo por longdaŭra vivo kaj kresko de nia "Objektivo" estas la partopreno de ĉiuj. Manko de kunlaboro, interhelpo estus kondamno de nia celo, de nia tuta objektivo .... kaj ĉu iuj kiel veraj homoj, konsciaj proletoj tion deziras ?

Ĉu vi jam pensis ke daŭre la eŭropa kontinento estis kaj estas la avangardulo! Se vi dubas rigardu la SAT-jarlibron 1956-57, t i e vi konstatos ke dum en la tuta amerika kontinento estas 123 SAT-anoj, nur en Britio estas 124 kaj en t u t a Eŭropo preterpasas 2.500. Cetere ju pli da SAT-anoj estas, des pli socialismema estas la lando: vidu Nederlandon, Jugoslavion, S v e d i o n, Francion ktp... Sajnas ke se ni, amerikanoj, volas kontribui en sociperfektigo de nia mondo ni devas vekiĝi, estas pli ol tempo!

Karaj Amikoj, ankoraŭ tro malmultaj voĉoj aŭdiĝis ĉe "La Objektivo", sed ni ne senesperiĝas, ĉar malnova maŝino kiu restas longe sen funkcii ĉiam rustiĝas, kaj por reaktivi ĝi devas oleumiĝi iom post iom, malrapide ĝis kiam la ritmo akiru la normalan pulsadon... Tiel SAT en Sudameriko, t i a l nia fido restas. Ho ve, ni estas kvazaŭ maŝino en dezerto, kio malbonigas la situacion ĉar daŭre blovas la ŝtorma sabloza ventego kiu emas ensabligi nin, sufokigi nin, eĉ ne lasante espereton pri oazeto!

Kio estas tiu metafora ŝtormo se ne la malracio de n i a homaro?

La ŝtormo kronologie estas: la dioj per kiuj la homo kreas al si vanajn esperojn, k a j alkonformiĝas tra dogmoj, kredoj, ritoj, ks. La papaj kaj ŝtataj despotoj kiuj demagogas por vampire sangadi nin, tra politiko, eduko, kultoj, misformigado de scienco k a j tekniko. La ŝtormo estas: Religiismo, naciismo, kapitalismo, tradiciismo, faŝismo kaj ĉiuj ismoj konsekvencaj. La tempesto de nia homaro estas: milito, atombombo, la scienco kaj tekniko kiam ili neniigas n i n anstataŭ nin liberigi; estas kinejo, futbalejo, trinkejo; estas alkoholo, tabako kaj ĉiuj kromaj popolaj opioj kiuj blindigas nin.

Ĉu tie ne k u ŝ a s sufiĉe da motivoj por ke ni skuiĝu senprokraste? Ĉu la malracio ne atingis sufiĉe neniigan staton kun ĉiuj atombomboj, kun tiu faŝismo kiu robotigas n i n, kaj instrumentigas, forigante nian minimuman homan dignon? Ĉu vere ne ekzistas rimedo por liberiĝi komplete, por rekonstrui sociordon kie la homo e s t o s homo, konscia homo? Ĉu longe ni kontentiĝos per nia minimuma salajro, per nia futbalspektado semajna, per nia ĉiutaga glaseto da arako kaj per nia kutima preĝado? ĉu longe ni lasos ĉekokse f a l a d i niajn brakojn kaj stertoros: "Ni nenion povas fari kontraŭ la destino."

Nu Karaj Geamikoj, ni ne kredu ke tia letargio persistos, ĉar nia destino estas ni, nur ni kaj de ni dependas, Ni fidu nur al ni, ni agu kaj reagu, NI KONSCIU PRI NIA HOMA POZICIO, FOR DE LA MISTIKAJ PERTURBOJ, F O R DE LA DIAJ FIKCIOJ, FOR DE L A AGITADOJ POLITIKAJ, FOR DE LA FILOZOFIAJ METAFIZIKAĴOJ, F O R DE LA KREDOJ ARTEFARITAJ KAJ DOGMAJ. NI ELIRU LA ĜENERALAN MISTIFIKADON EN KIU VADAS NIA HOMARO, POR KE NI POVU ANTAUVIDI KAJ KONSTRUI PLI HARMONIAN SOCIORDON: VERAN SOCIALISMON.

NI TAMEN RIDU....

NENORMALECO

Kamparano el Mato Groso finfine decidiĝas veturi al la granda urbo, konsulti kuraciston. "Nu kion vi sentas, amiko? - Ha, sinjoro, jam de jaroj mi suferas je maldormemo. - De jaroj, ĉu eble? - Jes ja! Kion ajn mi penas, ĉiun duan aŭ trian tagon mi vekiĝas."

EN VIVTEATRO

Laboristo kiel aktoro: - Jes, Sinjoro direktoro, estas v e r a arto vivi el la salajro kiun vi pagas.
Direktoro: - Do montru, ke vi estas vera artisto!

ELDONKVANTO
1000 Ekzempleroj
PREZO
$8 kr. aŭ 1Rpk Por numero

ŜI (ĉe spiritisma t a b l o) - Kara edzo mia, ĉu vi nun estas feliĉa?
LIA VOĈO - Jes.
ŜI - Pli ol kiam vi vivis kun mi?
LIA VOĈO - Jes.
ŜI - Kaj kion vi faras, en la paradizo?
LIA VOĈO - Sed mi ne estas en la paradizo, mi estas en la infero.